

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Guido Holz

1. La luno nun ekhelas,
Steletoj oraj belas
En la ĉiela klar’;
L’arbaro nigra revas,
Kaj el herbejo levas
Mirige sin nebula mar’.

2. Silenta estas mondo
Kaj en krepuska rondo
Hejmecas kun favor’!
Similas kalman ĉelon,
En kiu vi kverelon
De l’tago dorme pelu for.

3. Ĉu vi la lunon konas?
Aspekto nur duonas,
Sed rondas ĝi en bel’.
Do ankaŭ estas multo,
Loganta al insulto,
Okulojn ĝenas la malhel’.

4. Ni homoj tiel vantaj
Ja estas nur pekantaj,
Malvasta nia sci’;
Ĥimerojn ni eltrikas,
Ni multe artifikas
Kaj perdas celon pli kaj pli.

5. Vidigu, Dio, savon,
Pasem’ ne veku ravon,
Ne ĝoju ni pro glor’!
Fariĝu malafektaj
Ni kaj al vi respektaj,
Infane gaju nia kor’!

...

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

1. La luno nun leviĝis,
La steloj eklumiĝis,
Subiĝis jam la sun’.
Silentas la arbaro
Kaj super la kamparo
Nebulo blanka kuŝas nun.

2. La mondo ŝajnas kiel
Hejmeca ĉambro, tiel
Trankvila estas ĝi.
Dormante ĉiun penon,
Aflikton kaj ĉagrenon
Dum nokta hor’ forgesu vi.³

3.) Jen staras ĉe l’ ĉielo
Tre eta fora stelo,
Sed tamen egas ĝi!
Ja estas ofte aĵo
Por ni nur ridindaĵo;
Ĉar ne videblas ĝi al ni.

4.) Ni homaj fieruloj,
Mizeraĵoj ni pekuloj,
Malmulton scias ni!
Ni faras multajn aĵojn
Kaj artajn elpensajojn,
Sed vana estas tio ĉi.

5.) La Dian savon vidu
Ni nur kaj ni ne fidu
je vanta iluzi’!
Ni malfieraĵoj iĝu,
Ni ĝoju kaj piigu,
Infan-egalaj estu ni!

...

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Joachim Gießner

1. La luno jam leviĝis,
steletoj ekheliĝis,
ravante homojn nin.
Silentas la arbaro
kaj super la kamparo
nebulo pala levas sin.

2. Neniu vento blovas,
la mond’ ne plu sin movas
sub paca, klara lun’.
Nun petu noktano benon,
de l’tago la ĉagrenon
dormantaj vi forgesu nun.

3. Jen luno sur ĉielo
en brila rinda belo
duon-videbla nur.⁴
Ĉar multon ni ne vidas,
ni ofte ĝin priridas,
malsaĝe juĝas kun plezur’.

4.
.....
.....
.....
.....
.....

5.
.....
.....
.....
.....
.....

...

³alia versio:

2.) Ah, kiel trankvileca
La mondo kaj hejmeca
Vespere estas ĝi!
En tiu kalma paco
Ekdormu vi pro laco,
Forgesu la aflikton vi!

⁴S-ro Gießner unue tajpis:
duona tamen nur.

6. Vi gracu, sen ĉagreni
El mondo nin forpreni
Al fin' per milda mort'!
Kaj post forpren' fidele
Hejmigu nin ĉiele,
Sinjoro, Dio, nia fort'!

7. Kuŝiĝu do kun pio
Vi en la nom' de Dio,
Jam fridas nokta vent'.
Per punoj, Di', ne ĝenu,
Per dolĉa dorm' nin benu,
Najbaron ankaŭ en turment'.

*Traduko de la Germana poemo
"Abendlied" de MATTHIAS CLAU-
DIUS (*1740-08-15 - †1815-01-21)
en Esperanton de GUIDO HOLZ
(*1920 - †1989).*

Arg-394-778 (2007-03-26
12:53:22)

*Tiu ĉi traduko estas publikigita
en 1984 en "Esperanto aktuell",
la organo de Germana Esperanto-
Asocio, sur la aldonaj "Flavaj
paĝoj", sur paĝo 14 de la numero
6/984. Mi, Manfred Retzlaff, de-
tajpis la tradukon el tiu, en 2007-
03-26. Enigis la tradukon de Guido
Holz la tiama redaktisto d-ro Dirk
Willkommen.*

6.) Finfine vi nin prenu
El tiu mond', ĉagrenu
Ni ne pro tio ĉi!
Kaj kiam vi nin prenos,
Ho faru, ke ni venos
En vian regnon, kara Di'!

7.) Gefratoj, enlitiĝu,
Trankvile endormiĝu!
Noktiĝas ĉie ĉi;
Vin gardos nia Dio.
Li regas super ĉio.
Ĝis morgaŭ nun ripozu vi!

*Traduko de la Germana poe-
mo "Abendlied" de MATTHIAS
CLAUDIUS (*1740-08-15 - †1815-
01-21) en Esperanton de MAN-
FRED RETZLAFF (*1938-11-04)
en 1989-09-10.*

MR-013-2 / Arg-394-777 (2007-
03-26 13:19:45)

*Tiu ĉi traduko estas unue pu-
blikigita en 1984 en "Esperan-
to aktuell", numero 6/1984, la
organo de Germana Esperanto-
Asocio, sur la aldonaj "Flavaj
paĝoj", paĝo 15. Enigis ka tekston
de la traduko la tiama redaktisto
d-ro Dirk Willkommen. Mi, Man-
fred Retzlaff, ŝanĝis en 2007-03-
26 nur la duan strofon, kompare
al la teksto aperinta en "Esperan-
to aktuell 6/1984".*

6.
.....
.....
.....
.....
.....

7. Ĉe l'fino de la tago
kuŝigu vin sen plago,
silentas la anim'.
Ne punu nian faron,
sed nin kaj la najbaron
dormigu, Dio, nun sem tim'.

*Traduko de la Germana poemo
"Abendlied" de MATTHIAS CLAU-
DIUS (*1740-08-15 - †1815-01-
21) en Esperanton de JOACHIM
GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-
11-25).*

Arg-394-782 (2007-03-28
09:55:34)

*Mi, Manfred Retzlaff, detajpis ti-
un tradukon de Joachim Gießner
el folio kun letero, kiun skribis al
mi en 1987-11-24 s-ro Joachim
Gießner. Li skribis en tiu letero,
ke la fakto, ke lia traduko de la
unua strofo estas tute la sama kiel
en tiu de Otto Bonte, estas ha-
zardo kaj ke li ne sciis antaŭe la
tradukon de Otto Bonte.*